
Ne estu koko... venu al KKPS!!!

De la 2a ĝis la 4a de Novembro 2012 okazos renovigita versio de la **PostSomera KlaĉKunveno**.


Internacia organiza teamo bonvenigos vin en **Delft (NL)**. Estos prelegoj, ludoj, ekskursoj, muziko, kaj ĉefe...klaĉoj!

La programo komenciĝos vendrede posttagmeze, sed se vi volas resti kelkajn tagojn antaŭe aŭ poste, ni klopodos aranĝi gastigadon por vi.

Vizitu nian retpaĝon <http://klacxkunveno2012.wikispaces.com> , restu ĝisdata pri la novaĵoj en la Facebook-paĝo de la evento, marku la datojn en via agendo, kaj aliĝu!

La organizantojn vi povas kontakti per la retadreso: kkps2012@googlegroups.com





Pos-Amiko

Somero 2012, Numero 1

INDEKSO:

- Trovitaj dokumentoj konfirmas:
Lukiz volas iĝi
diktatoro..... 1
- Scienco pruvas ligan inter
vodko kaj
ebrieco.....2
- Pepo kaj Poso kaptitaj en
korupta skandalo.....2
- La horoskopo.....2
- Marek Blahuš evidentiĝas
roboto.....3
- Probal Dasgupta kabeas:
“Mi konfuzis Esperanton kun
hispana”.....3
- EVENTOJ..... 4

Trovitaj dokumentoj konfirmas: Lukiz volas iĝi diktatoro.

En ŝoka revelacio pasintsemajne en la Verdejo, la somera palaco de Varsovia Vento-gurao Irek B., estis trovitaj notoj kaj taglibro, kiu malkovras longdaŭrajn planojn de TEJO-perfidanto Łukasz Żubrowski kaj konspirantoj por kapti absolutan povon en TEJO. La sekvaj faktoj povas ŝoki la legantojn (sed pli verŝajne amuzos ilin).

La konspiro komenciĝis en 2010, kiam Gregor Hinker, la tiama perfidanto de TEJO, ne povis veni al estrarkunsido pro erupcio de Eyjafjallajökull. Nun montriĝas, ke Żubrowski erupciigis Eyjafjallajökull por forpeli Gregor el la kunsido kaj tiel subfosu lian pozicion. Ŝajne sukcese, ĉar en 2011 Lukiz fariĝis la 27-a perfidanto de TEJO. Indas rimarki, ke por ĉiu posteno estis ekzakte unu elektebla kandidato.

En 2011 kaj 2012 Żubrowski forigis la restantajn kontraŭulojn el la oficoj de TEJO: la volontulon en decembro, la redaktoron de TEJO Tutmonde en januaro, la kaŝiston en aprilo kaj la ĝeneralan sekretulon en majo. Iliajn lokojn prenis proksimuloj de Żubrowski: Natalia, Paweł kaj Szabolcs, ĉiuj el Varsovio, kaj Przemysław el Bjalistoko, Polujo. La nun trovitaj dokumentoj montras planojn por forigi la ankoraŭ restantan reziston: la planoj eĉ inkluzivas 'kabeigojn' de gravuloj.

Ĵus antaŭ presado de tiu ĉi PosAmiko sennomulino el Canale, Italujo komentis, ke ŝi vidis novan kaŝiston Nico Huurman movi gravajn dokumentojn al fortikaĵo norde de Roterdamo. Nico rifuzis komenti.

Scienco pruvas ligan inter vodko kaj ebrieco.

Esperantistoj el la tuta mondo lunde kiel baton ricevis la novaĵon pri nova scienca studo, kiu pruvas statistike signifan ligan inter drinkado de vodko kaj ebrieco. D-ro B. Telo, profesoro ĉe la Internacia Akademio de Sciencoj en Sanmarino, raportis: “ni faris multnoktan studon dum la proksime okazinta scienca forumo IJF, kaj niaj datumoj ne mensogas: kie estas vodko, tie estas ebrieco. Ni ankoraŭ ne scias, ĉu drinki vodkon kaŭzas ebriiĝon, aŭ ĉu ebriiĝi kaŭzas drinkadon de vodko.” La scienca teamo de sciencistoj planas plian esploron pri ligoj inter biero kaj ebrieco en Nederlando en novembro.



(En la bildo: Unu el la partoprenintoj al la eksperimento)

Marek Blahuš evidentiĝas roboto.

Malfermo de malnovaj ĉeĥoslovakaj arĥivoj malkaŝis la ekziston de sekretega armea projekto por krei homsimilan roboton, sub la nomo Blarek Mahuš. En 1986 unu prototipo eskapis, kaj sukcesis eviti rekaptiĝon per ŝanĝi sian nomon kaj ekloĝi ĉe loka familio. La robotoj de la serio Blarek tamen estas facile rekoneblaj: pro eraro en la voĉkomputilo ili parolas tro rapide kaj foje en sensenca lingvo kun nur 123 vortoj. Feliĉe por la sekureco de la ĝenerala publiko la slovaka sekurecservo poste sukcesis kapti la eskapintan prototipon per la programo 'Eskapanto@Izolreto', mallonge E@I.

Pepo kaj Poso kaptitaj en korupta skandalo.

Poso, la simbolo de tiu ĉi mondfama gazeto, kaj Pepo, simbolo de loka klubo por trajnfanatikuloj TEJO, estis hieraŭ fotitaj de ĵurnalisto de Livera Folio dum transdonado de ŝmirmono. La celo de la mono ne estas konata. Pepo kaj Poso anoncis komunan gazetaran konferencon en Delfto por nei la akuzojn.

Frisujo deklaras sendependecon.

Nederlandanoj: “Kie estas Frisujo?”

Krokodiloj ŝtelas krokodilon.

Dum propaganda kampanjo en la 'Pluretna Respubliko' en Torino fiuloj ŝtelis nepageble valoran simbolon de la movado: pluŝan krokodilon, kiu apartenis al Manuela R. La nekonsolebla viktimo diris: “Ĝi malaperis ĉe la E-budo en festo de la Pluretna Respubliko. Mi ne estis en la budo, kiam ĝi malaperis, tiam deĵoris aliaj klubanoj. Estas rekompenco por tiu, kiu retrovas ĝin!” TEJO sin preparas por deklari militon al la Pluretna Respubliko, se ili ne respondos al la ultimato antaŭ la 3-a de novembro.

Probal Dasgupta kabeas: “konfuzis Esperanton kun hispana”.

Probal Dasgupta, prezidanto de UEA, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj verkisto de multaj esperantaj libroj, hieraŭ neatendite anoncis sian rezignon el ĉiuj menciitaj postenoj. Li klarigas: “Kiam mi aĝis dek ses, mi volis lerni la hispanan por esplori la mondon, sed ĉar mi loĝis en eta vilaĝo [Kalkato, Barato – red], mi ne povis trovi lernolibrojn nek instruiston. Iun tagon mi trovis broŝuron kun titolo 'Esperanto', pensante ke tio temas pri la hispana. La vortoj ja tre similas.”

Dum la sekvaj 40 jaroj Dasgupta aktivis en la esperanto movado pensante, ke ĝi estas hispana movado. Eĉ dum vizitoj al hispanlingvaj landoj kia Kubo li ne rimarkis sian eraron: “Mi apenaŭ parolis kun lokanoj, tiuj fiaj organizantoj ĉiam sendis al mi esperantoparolantajn kubanojn!” Dasgupta nun planas lerni la hispanan kaj iĝi prezidanto de la Universala Hispana Asocio. “Tio ekzistas, ĉu ne?”

La horoskopoj

Ŝafo: Vi renkontos interesan fremdulon, kiu ŝtelos vian monujon.

Taŭro: Vi ebriiĝos. Atentu, tio povas kaŭzi drinkadon de vodko!

Ĝemeloj: Aŭgusto estos bona monato por amo, sed eĉ pli por trajnoj.

Kankro: Vi malkovros, ke vegetaranoj pli bongustas ol vegetaraĵoj.

Leono: Vi ekhavigos novan hobion kaj malnovan fobion.

Virgulino: Post vizito al FESTO vi ne plu estos.

Pesilo: Vi ne kredas je astrologio kaj pro tio ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Vi mortos je la 5-a de novembro 2012.

Aleks Kadar: Vi vundos vian piedfingron dum algluado de poŝtmarko.

Sagitario: Vi ekhavigos novan amikon, kiu malbele kantas ebrie.

Kaprikorno: Vi ricevos misteran donacon de nekonatulo. Ĝuu!

Akvisto: Vi lernos novan lingvon, sed ankaŭ forgesos ĝin.

Fiŝoj: Vi aliĝos al sekto, razos viajn harojn, kaj enuiĝos.